# Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland
24a jarkolekto • n-ro 3 | **majo-junio 2019**

KIEN VOJAĜOS VI?

Verku ĉi-somere pri via vojaĝo kaj kontribuu al la venonta Fenikso!



6-7 raporto pri la jarkunveno de Esperanto Nederland

8 Paralela Universo

10 Nova komitatano A prezentas sin

12 Revuo-interŝanĝo



14 Nova Esperanto-projekto pri saniga vivmaniero

# Fenikso

## Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
**ISSN 1384-6515**

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.
La jara kotizo estas € 35,-
(por samdomanoj €12,50).
NEJ-anoj pagas € 15,-
(por samdomanoj € 5,-).

Fenikso estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando.
La tarifo estas € 20,-.

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version de Rob Moerbeek, vidu dekstre.

## Redakcio:

- **Ĉefredaktoro:** Frank van Hertrooij
- **Redaktoro:** Marc Konijnenberg
redakcio@esperanto-nederland.nl

## Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la 1a de aŭgusto 2019.

**Informoj pri Esperanto:**
Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
(info@esperanto-nederland.nl)
tel.050-5718842

**Studie-weekeinde:**
(studosemajnfino@esperanto-nederland.nl).

## Estraro

- **Estraro:** (estraro@esperanto-nederland.nl)
- **Prezidanto:** Said Mozaffari Baluchi, (prezidanto@esperanto-nederland.nl) tel. 06 84316394
- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp (sekretario@esperanto-nederland.nl)
- **Kasisto:** Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, 2903 AC, Capelle a/d IJssel. (kasisto@esperanto-nederland.nl) tel.010 2133320
- **Estrarano:** (i.a. pri instruadaj aferoj): Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE, Beverwijk. (rob.moerbeek@esperanto-nederland.nl) tel.0251 231079
- **Estrarano:** Andries Hovinga, De Fennen 47, 8918 CC, Leeuwarden, tel.06 28916262 (andries.hovinga@esperanto-nederland.nl)
- Pri sociaj komunikiloj: (sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)
- **Membro-administranto:** Koos Scharroo, Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord. (membroj@esperanto-nederland.nl) tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero

**Bankkonto:**
IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
nome de Esperanto Nederland, Capelle aan den IJssel.
UEA-konto: esne-h

**Eventueel retouradres:**
Esperanto Nederland Ledenadministratie,
Vaartweg 24G
8382 EB
Frederiksoord

# Enhavo



| | |
|---|---|
| Enhavo | 3 |
| Mallongaĵoj | 4 |
| Malkovru: EKU | 5 |
| Ineke Emmelkamp rakontas | 6+7 |
| Paralela Universo | 8 |
| 18-a NR | 9 |
| Nova Komitatano A | 10 |
| ZEO en Bergen op Zoom | 11 |
| Revuo-interŝanĝo | 12 |
| Vortserĉenigmo | 13 |
| LAR: Saniga Vivmaniero | 14 |
| Nekrologoj | 15 |

# Mallongaĵoj



## Triopa Kongreso

Kajto regalis per fasko da kantoj la ĉeestantaron de la Triopa Kongreso (la 78a Hispana E-Kongreso, la 21a Andaluzia E-Kongreso kaj la 71a IFEF-Kongreso), kiu okazis en Malago en 2019.
Aliĝis ĉirkaŭ 180 homoj el 23 landoj, eĉ ekstereŭropaj (el Ĉinio, Japanio, Korea Popoldemokratia Respubliko kaj Brazilo)
Jen prezento de la konata "Procesio multkolora" de Kajto:
**https://www.youtube.com/watch?v=q-NCxXEJp7g**



Fotis: **Thijs Franssen**

## Gratulon, Joost!

Joost Franssen, membro de Esperanto Nederland, ricevis la konfirmon ke li sukcese diplomiĝis magistre **kun laŭdo** pri matematiko (ĉe la Universitato de Utreĥto).

La redakcio de Fenikso kaj la estraro de Esperanto Nederland kore gratulas lin!

**La disertaĵo pri Esenca Dimensio estas legebla (en la angla) ĉe la retpaĝo:**
**dspace.library.uu.nl/handle/1874/380743**

## Tromppet' en retpoŝtkesto!

Kelkaj esperantistoj ricevis retpoŝton en Esperanto de personoj en Afriko. La skribinto promesas multe da mono, tiu heredis la monon de parenco, *kaj tiel plu*. Vi devus nur sendi kelkajn informojn kaj la mono povas esti via...
Esperantistoj volonte helpos alilandajn esperantistojn, sed gardu vin kaj **ne** reagu al tiuj petoj, vi nur perdus monon.

## Esperanto en Brainwash Talks

Nia lingvo estis menciita kaj iom klarigita al la televidspektantaro de Nederlando en Brainwash.
Brainwash estas *scenejo por surprizaj ideoj.*
Frank Westerman parolis pri Esperanto kaj la ideo malantaŭ ĝi.
Spektu ĉe:
**bit.ly/BWTalksFrankWesterman**

# MALKOVRU EKU!

## LA DUOLINGO-KLUBO EN UTRECHT: ALIREBLAJ RENKONTIĜOJ POR PAROLANTOJ DE ĈIUJ NIVELOJ

★ ★ ★

Esperanto-Klubo Utrecht estas grupo de parolantoj kaj lernantoj kiuj dufoje monate renkontiĝas. La organizantoj celas paroligi kaj amikigi. Homoj kutime portas tabloludojn al la renkontiĝo; vi povas porti viajn proprajn!

Ĉiuj aĝoj estas bonvenaj!*

*personoj sub la aĝo de 18 devas esti akompanataj de plenkreskula prizorganto, laŭ la regularo de Duolingo.

https://events.duolingo.com/utrecht-esperanto

**Ineke Emmelkamp**

# Kion mi faris la 25an de majo kaj la tagojn poste?

La 25an de majo mi frue forlasis mian hejmon, je la 06.40a horo.  Mi ekvojaĝis por iri al la membrokunveno de Esperanto Nederland, kiu okazis en Rotterdam. Groningen kaj Rotterdam ja ne estas tre proksimaj unu al la alia.

La kunveno okazis en  la Centra Oficejo de UEA. Antaŭe mi jam sciigis al la estraro ke mi ne tre kontentas pri la loko. Homoj, kiuj ne facile povas iri, ne povas grimpi la multajn ŝtuparojn en la oficejo. Kaftrinkado okazis en la suba etaĝo.  La seĝoj staris pretaj en la supra etaĝo. Por atingi la libroservon, necesas alia ŝtuparo! Mi sidis ĉe la enskribiĝtablo. Ofte mi faris tion kun Ans, sed ĉi-jare ŝi ne povis ĉeesti la kunvenon.

Fine mi akceptis 23 membrojn. Kelkaj kunportis voĉdonilojn de membroj (5) kiuj ne povis ĉeesti.

Entute 28 validaj voĉoj. Denove Hiddo estis nia tagprezidanto. Li lerte gvidis nin tra ĉiuj tagorderoj. La protokolo de la pasinta jarkunveno estis akceptita, same kiel la jarraportoj de 2017 kaj 2018. Ĉiuj financaj raportoj estis en ordo, dank' al Loes.

Post tiuj punktoj venis grava afero. Elekto de novaj estraranoj. La sekretario Pieter ne finis sian deĵorperiodon ĝis la jarkunveno; jam en la printempo li foriris. Feliĉe ni havas la sistemon ke funkciuloj havas retadreson de la asocio. Mi anoncis al la plufunkciantaj estraranoj, kiuj ne sciis kien sin turni, ke mi pretas provizore transpreni tiun retadreson. Post funda pripensado mi decidis kandidatigi min kiel sekretarion. Por du jaroj maksimume. Dum tiuj du jaroj mi esperas ke iu alia kandidatiĝos kiel sekretario.



*La novelektita estraro.* Fotis: **Marc Konijnenberg**

En la kunveno mi diris ke la organizado de studsemajnfinoj estas kaj estos mia plej grava tasko. Ni havas bonan teamon de tri personoj kaj (preskaŭ) ĉio glate iras.
Ĉiam estas novaj partoprenantoj. Tiuj novaj Esperantistoj jam plurfoje faris ion por la asocio. Unu, Marc, jam plurfoje instruis Esperanton kaj fariĝis nun komitatano A de UEA por Nederlando kaj unu el la redaktoroj de Fenikso.
Alia persono, Terry, faris kelkajn belajn grafikaĵojn por Esperanto Nederland.
Mia dua grava tasko estas prizorgi la informadon pri la lingvo Esperanto al interesatoj. Mi daŭre zorgas ke estas sufiĉe da informmaterialo!

La aliaj estraranoj Said, Andries kaj Loes estis reelektataj por nova periodo de tri jaroj. Rob Moerbeek daŭrigas sian funkcion en la estraro kaj mi estas la *'novulo'* kune kun Korine Cheizoo!

La kunveno estis daŭrigata. Ni gratulis kelkajn fidelajn membrojn. Surprizita mi estis kiam mi aŭdis ke Andries kaj mi gajnis la Verloren van Themaatpremion por nia laboro dum Lân fan Taal. Dankon, ĵurio.




*Andries kaj mi tenante la atestilojn.*
Fotis: **Marc Konijnenberg**

La estraro anoncis la partoprenon en la Drongo-festivalo. Instigas la membrojn iri al la Beneluksa Kongreso en Charleroi. Petas kunlaborantojn por la organizota Festo.
Feliĉe kelkaj homoj anoncis sin. Ĉu vi emas fari taskon? Skribu al mi!

Mi estis hejme, je la 20.00 horo!

***Kion mi faris post la 25a de majo?***

Mi prizorgis ke nia nova Komitatano A estu oficiale registrita.
Multaj retmesaĝoj kaj pluraj subskriboj necesis!
Mi sukcesis organizi la datojn por la venontaj estrarkunsidoj en la jaroj 2019 kaj 2020.
La unua estrarkunsido okazos la 31an de aŭgusto, en Utrecht! La venonta jarkunveno okazos la 23an de majo en Utrecht!
Nun mi pripensis aranĝi komunan estraran datumaron. Dum la Germana Esperanto-Kongreso mi aŭdis kiel oni aranĝas tion en Germanio!

Amike,
Ineke Emmelkamp

P.S. Miaj vortoj ne estas la oficiala raporto de la membrokunveno.
Ĝi certe aperos en unu el la venontaj Feniksoj aŭ Informilo.

# Paralela Universo

**Yves Nevelsteen (Loveno), Klaas Dijkstra (Antverpeno) kaj Viviane Tits (Lieĝo) invitas ĉiujn al Antverpeno por unuafoje partopreni en Paralela Universo. Se vi intencas veni, bv. sciigi tion al Yves.**

## Kio ĝi estas?

Paralela Universo estas unutaga festo de Esperanto, okazonta en diversaj lokoj samtempe. Paralela Universo ne estas telekongreso. La celo estas ĝui amikecon kun la homoj kiuj estas proksime de vi. Tamen, parto de la amuzo de la tago estas dividi fotojn kaj rakontetojn kun la aliaj grupoj kiuj kunvenas. Tial ni intencas afiŝi fotojn kaj salutojn per Facebook kaj Telegram. Eble ni ankaŭ interkomunikos pervoĉe dum la evento, uzante Skajpon kaj similajn komunikilojn.

## Kial ĝi estas?

Por doni al vi la oportunon paroli Esperanton nerete, renkonti novajn amikojn, kaj krei ĝuindajn memorojn. Nia celo estas ke ĉiu kiu volas partopreni, povu sen vojaĝi tro for. Ni celas ke oni povu atingi eventon malpli ol 4 horojn for de vi.

## Kion ni faros?

Tio parte dependos de la ĉeestantoj, sed jen kelkaj ideoj:

-Yves gvidos paroligan rondon kaj povos instrui pri gramatikaĵoj

-Eblos malkovri la Esperantocentron kaj aĉeti librojn. FEL-eldonojn vi rajtos aĉeti **kun rabato je 10%.** Kiam oni tiam abonos la revuon Monato vi ricevos ĝin **3 monatojn senpage**.

-Adam Brooking prezentos sian ludon 'Fek parolu' kaj ni kune ludos ĝin.

-Klaas montros filmojn kun subtekstoj en Esperanto (20-45 minutoj)

-Klaas povos gvidi kvizon

-Estas pluraj Skrablo-tabuloj en la Esperanto-centro kaj ankaŭ aliaj ludoj

-Kaj... ni do eksperimentos per virtuala esperantumado per Telegram, Skype, Facebook ktp

En la Esperantocentro troviĝas trinkejo kaj kuirejo.
Ella Strug volas pretigi por ni supon.
Se vi loĝas iom for, eblos jam veni vendrede kaj tranokti ĉe lokaj esperantistoj. Avertu nin frue, estas limigita nombro de litoj!

Bonvenon!

Retpoŝtadreso: yves.nevelsteen@gmail.com

17a de aŭgusto
10:00-17:00
Lange Beeldekensstraat 169
Antwerpeno

18a

# NOVJARA RENKONTIĜO

2019-2020

de la 27-a de decembro 2019 ĝis 3-a de januaro 2020, vendredo ĝis vendredo en Wiesbaden, samtempe kaj samloke kun la 11-a NIS, la programo por junuloj.

Informpaĝo kun aliĝilo:
esperantoland.org/nr/index.shtml#nr



*Nia nova*

# Komitatano A

**Marc "Marko" Konijnenberg:**
Saluton! Mi sentas honoron povi prezenti min al vi kiel komitatanon A nome de Esperanto Nederland.
Mi komitataniĝis post la jarkunveno en majo, laŭ rekomenda voĉdonado kiu okazis dum la jarkunveno.
Mi estas freŝa esperantisto, do se vi ankoraŭ ne konas min, mi rekomendas al vi legi la artikolon en Fenikso n-ro 6 de 2018 (paĝo 15).

En la antaŭe menciita artikolo vi jam povis legi ke mi estis en la komitato de TEJO kiel unu el ĝiaj estraranoj.
Mi esperas porti scion el tiu sperto al mia laboro en la komitato de UEA.
Estos defio, denove surŝultrigi novan rolon, sed mi provas bone prepari min legante ĉiujn informojn en la teko de UEA, kaj mi multe komunikiĝos kun la estraro de Esperanto Nederland.
Mi ankaŭ esperas komunikiĝi kun la membraro. Eblas alskribi min:

**marc.konijnenberg+komitatano@gmail.com**

**ESTONTECA DIREKTO:**
Persone mi tre interesiĝas pri la financa resanigo de UEA, kaj la evoluanta kunlaboro inter UEA kaj TEJO. Tamen, mi kompreneble ne agas nure laŭ miaj propraj interesoj, sed ankaŭ laŭ la interesoj de Esperanto Nederland, do vi.



# *Kial staras Esperanto-monumento en Bergen op Zoom?*

La Esperanto-asocio de Bergen estis fondita en 1910. Pasis jaroj ĝis estis konstruita la monumento, ĝi estis oficiale inaŭgurita (kun ĉeesto de Lidia Zamenhof) la 29-an de julio en 1933.
Post kiam la nazi-politikisto Seyss-Inquart malpermesis Esperanto-asociojn en la dua mondmilito, decidiĝis ke anticipe la teksttabuloj estu forprenitaj kaj kaŝitaj. Krome, la terglobo kun la vorto Esperanto sur ĝi estis blufarbita, por ke la monumento ne kaptu la atenton de la okupanto.

En la jaroj post la dua mondmilito la monumento pli kaj pli disfalis. En la 70-aj jaroj oni eĉ konsideris tute forigi la ZEO-n. Fine tio, feliĉe, ne okazis, kvankam la monumento nur fine de la 20a jarcento oni ekrestaŭradis la monumenton.

Indebuurt BoZ (Bergen op Zoom) publikigis artikoleton pri la ZEO la 15an de junio.
Indebuurt informas loĝantojn pri lokaj novaĵoj, ĉi-kaze pri malnovaĵo.

Ĉu iu komencos lerni Esperanton post kiam tiu lernos pri nia lingvo en novaĵretejo de sia regiono? Povas esti!

Pli da informoj pri la Esperanto-asocio de Bergen kaj pri la monumento ĉe:

**https://esperanto-nederland.nl/ned/weet/Esperanto%20monument%20in%20Bergen%20op%20Zoom%201.pdf**

**Dankon al Foppe-Klaas Hovinga por la atentigo pri la apero de la artikolo!**








# Revuo-interŝanĝo
## de Alfonso Pijnacker

**Revuo-Interŝanĝo.**
Jen nova nomo por malnova rubriko, kiun ĝis nun prizorgis Gerrit Berveling. Kelkfoje tiu ĉi rubriko nomiĝis Ricevitaj Revuoj, kelkfoje Legindaj Artikoloj. La tasko, kiun mi transprenis, povus enhavi iom pli ol regule verki artikolon pri legindaj artikoloj en interŝanĝe ricevitaj revuoj. Tiu ĉi projekto stimulu aboni kaj interŝanĝi revuojn. Do, la slogano sonas: Abonu unu, legu du!
Se finance eblas, bonvolu aboni ŝatatan revuon kaj trovu aliulon – ie en la mondo – kiu pretas interŝanĝi. La revuoj, kiujn mi mem ricevis, estas haveblaj kaj mi laŭpete alsendos ilin.
Nun mi havas por vi:

**1. ESPERANTO, numero marto 2019, numero aprilo 2019, numero majo 2019.**
Ŝajnas al mi ke tiu ĉi nur primovada revuo de UEA estas sufiĉe konata.

**2. NOVA IRLANDA ESPERANTISTO, numero 151, marto/aprilo 2019.**
Simpla dulingva eldono, 12 paĝoj A5, grandparte primovada. La enhavo i.a. rilatas al ĉina fotokonkurso kaj faka seminario pri eŭropaj fervojoj.

**3. ESPERANTO AKTUELL, numero 253 (1-2019), numero 254 (2-2019).**
Profesia aspekto. Dulingva kaj grandparte primovada. Artikoloj pri aranĝoj kaj Herzberg gravas. Kontraŭe al Fenikso kun tro grandaj literoj, la literoj, plie pale presitaj, en tiu ĉi revuo necesigas ke mi aĉetu okulvitrojn.

**4. LA REVUO ORIENTA, numero 1160 (1-2019), numero 1161 (2-2019), numero 1162 (3-2019), numero 1163 (4-2019).**
Dulingva en A5-formato, profesia eldono.
– Numero 1160 (1-2019). Ĉefe pri la komuna kongreso de Japanio kaj Koreio fine de 2018 kun 422 vizitantoj.
– Numero 1161 (2-2019). Konatiĝo kun Orlando E. Raola (Kubo) kaj artikolo pri speciala maniero por trovi taŭgan edz(in)on. En banejo kun muro inter viroj kaj virinoj por ne vidi unu la aliajn, la partprenantoj prezentas klasikan poemon el kvin versoj, nome “utaon”. Surbaze de sono kaj verso oni povas elekti por persona konatiĝo.
– Numero 1162 (3-2019). Parto de la poemo Du Pomoj Perditaj de Verda Majo, plumnomo de Hasegawa Teru. Cetere estas artikolo per kio montriĝas ke ankaŭ en Japanio (aŭ certe en Japanio, mi ne scias) estas problemeto pri la uzo de li aŭ ŝi. La verkisto uzas “ri” por ne indiki la sekson aŭ genron.
– Numero 1163 (4-2019). Konatiĝo kun Li Weilun (Ĉinio). Enestas ankaŭ artikolo pri plastaj rubaĵoj. Do, ne nur en Nederlando oni pensas pri tiu problemo.

**5. AEU-BULTENO, numero 25, januaro-marto 2019.**
Simpla, grandparte primovada, asocia revuo en A5 formato, el Andaluzio. Enestas atentigo pri la franclingva libro Le Petit Nicolas, tradukita en pli ol 30 lingvoj, sed, ĝis nun, ne en Esperanto. Do, inspiro al traduklaboro. Kiu kuraĝas?
La bulteno havas 2 paĝojn kun citaĵoj, el kiuj mi unu prenas: “ La potenco de la regantoj konsistas el la seniniciatemo de la regatoj.”

**6. LA GAZETO, numero 200, 15-02-2019.**
Sufice bele presita revuo kun mondkultura artikolo Hermiona Oresto Neoptolemo. Enestas cetere la 14a kaj 15a ĉapitroj el Karna Sidkuseno de Li Yu. Mi ne legis tiujn ĉapitrojn ĉar mi ne aprezas nur partetojn el libro. Fakte oni bezonas daŭran abonon por plu legi.

**7. PURAJ PULMOJ, numero 2019/1.**
Reta (do memprintita) bulteno (4-paĝa) de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj (TADEN). Informoj pri la sekvoj de fumado. Agadas i.a. konataj nederlandanoj en tiu ĉi “batalema” asocio. Kunlaboru al senfum mondo!

**FINE**
Mi diru ke mi ne kontraŭas dulingvan revuon sed al abono ĝi ne logas min. Ja, duono de la enhavo ne legeblas. Pleje ne ŝatas mi daŭrigotajn rakontojn. Mi ne volas legi kun paŭzoj unu aŭ dumonatdaŭraj.
Nu, petojn kaj oferojn, reagojn eĉ plendojn vi povas sendi al: a.pijnacker@simpc.nl

**Alfonso**

# vortserĉenigmo

Solvu ĉi tiun someran enigmon per forstreki ĉiujn vortojn el la listo sube. La restontaj literoj kune formos frazon.

| | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| M | V | E | T | E | R | O | S | U | N | K | R | E | M | O |
| I | S | A | B | L | O | K | A | S | T | E | L | O | E | L |
| J | T | U | K | U | G | L | A | C | I | K | U | B | O | I |
| K | N | P | N | R | V | S | O | M | E | R | O | L | A | B |
| E | A | L | T | O | A | A | A | P | I | P | L | P | K | E |
| K | Ĝ | A | E | E | K | D | R | D | F | I | E | R | V | R |
| S | A | Ĝ | M | B | I | U | R | M | N | G | G | O | O | A |
| T | D | O | P | S | I | F | L | O | A | R | A | M | M | M |
| E | O | V | E | I | Ŝ | C | O | V | S | A | D | E | E | U |
| R | F | O | R | T | V | T | I | S | I | T | O | N | L | Z |
| E | E | J | A | E | I | E | G | K | I | T | A | A | O | I |
| R | R | A | T | L | T | N | O | J | L | L | R | D | N | Ĝ |
| N | I | Ĝ | U | O | I | D | O | R | M | I | E | O | O | I |
| E | O | I | R | P | L | O | N | Ĝ | I | N | L | T | J | A |
| A | J | K | O | V | O | K | O | N | G | R | E | S | O | N |

Akvomelono
Amuziĝi
Bicikli
Dormi
Ekstere
Ferioj
Fosileto
Glacikubo
IJK
Kongreso

Kradrostado
Legado
Libera
Naĝado
Pigra
Plaĝo
Plonĝi
Promenado
Sablokastelo
Sitelo

Somero
Sunkremo
Sunokulvitroj
Ŝviti
Temperaturo
Tendo
Varma
Vetero
Vojaĝi

# La Amsterdama Rondo: Saniga Vivmaniero

En la junia kunveno de *La Amsterdama Rondo*, kiu okazis la 16-an de junio, Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge prelegis pri siaj marŝadoj kaj travivaĵoj kaj publike prezentis sian novan projekton.

Kadre de la projekto oni celas instigi homojn je pli saniga vivmaniero, nome al regula promenado en la naturo. Pere de la kunmetitaj kilometroj de la partoprenantoj la kunpaŝantoj virtuale progresos karavane kaj vizitos Esperanto-klubojn kaj lokojn ĉirkaŭ la mondo.

Katalin kaj Sylvain en septembro 2018 trairis la 140 kilometran vojon de *Walk of Wisdom* ĉirkaŭ Nimego kaj nun preparas sin al la 4-taga paŝado ĉirkaŭ Nimego, kune kun Rob Keetlaer kaj du aliaj esperantistoj. Dum la paŝado ili celas informadi vaste pri Esperanto kaj kolekti subtenmonon por la supre menciita projekto.

En la kunveno ili skizis la planojn kaj dividis siajn ĝisnunajn spertojn, sed plej grave, oni kune pridiskutis kiel plej efike informi pri Esperanto kaj kiel vivi pli sane.



Katalin prezentas, sur la ekrano projekciitas bildo de la marŝema paro.

Fotis: **Andries Hovinga**

# Nekrologoj

## Wil van der Weijden
## –
## 5 aŭgusto 1918 – 15 marto 2019




Wil estis membro de Esperanto Nederland kaj de la Haga Klubo.
Krome ŝi dum multaj jaroj laboris en la Internacia Esperanto Instituto en Hago.
Ŝi i.a. ordigis librojn. Si estis modesta virino kiu ĉiam kun plezuro pretis fari la plej diversajn taskojn.

Bedaŭrinde ŝi dum la lastaj jaroj ne plu povis vidi kaj aŭdi, tial ŝi finis sian membrecon.
Ŝi translokiĝis al flegejo en Hago. Tie oni festis ŝian 100-jaran naskiĝtagon.
Ni vizitis ŝin kaj parolis pri ŝiaj memoroj pri Esperanto. Ŝia memoro restis bona!

Anneke kaj mi ĉeestis la funebran ceremonion kaj memorigis ŝian dumvivan korinklinon al Esperanto.

La aŭto kun la ĉerko veturis al la kremaciejo, tra la Zamenhof-strato en Hago.

Anneke Korfage
Marjet Erasmus

**Emile Van Damme**
**–**
**27.10.1927 – 07.05.2019**

Emile Van Damme estis belga instruisto pri lingvoj. Esperantistiĝis dum la Dua Mondmilito. Prezidanto de Esperantista Brusela Grupo de 1977 ĝis 1994, dum kies gvidado li organizis diversajn kursojn, i.a. en la Libera Universitato de Bruselo. Kunsekretario de la belga sekcio de ILEI. Kunaŭtoro de ABC-Gramatiko de Esperanto, Gramatika ABC-mempraktikilo kaj Leksikaj Ekskursoj. Verkis poemaron Dolĉe-amare kaj longdaŭre (ĝis sia forpaso) kontribuis per lingva rubriko al la revuo Horizontaal de Flandra Esperanto-Ligo; lia rebruko aperadis ankaŭ en Fenikso.

**Noto de la redakcio:**
La supraj nekrologoj jam aperis en la antaŭa numero de Fenikso; ili tamen enhavis etajn erarojn kaj estis detalmankaj.
La redakcio opinias ke la rememoroj al Wil van der Weijden kaj Emile Van Damme kaj la legantaro de Fenikso meritas ke la nekrologoj en plena formo reaperu.

# FENIKSO

24a jarkolekto, n-ro 3
majo - junio 2019

# Esperanto leren in het studieweekeinde

ESPERANTO NEDERLAND

Van 22 t/m 24 november 2019 vormt het natuurvriendenhuis Krikkenhaar bij Bornerbroek weer het middelpunt van het Esperanto-onderwijs in Nederland! Dan zal daar namelijk het bekende studieweekeinde van Esperanto Nederland plaatsvinden. Dit weekend is bestemd voor iedereen die een begin wil maken of verdere stappen wil zetten met het leren van Esperanto. In principe wordt er les gegeven op vier niveaus:

- De beginnerscursus is voor mensen voor wie Esperanto helemaal nieuw is. Aan de orde komen uitspraak en de grondbeginselen van woordenschat en grammatica en er worden eenvoudige gesprekjes gevoerd. Als je al Esperanto spreekt, heb je deze cursus natuurlijk niet nodig, maar denk eens na of het misschien iets is voor familieleden of vrienden die nog geen Esperanto spreken…
- Een cursus voor leerlingen met enige voorkennis. Zij zijn nu met hun eerste cursus bezig en willen het geleerde in de praktijk brengen en uitbouwen. Het is gebleken dat deze cursus ook een effectief hulpmiddel is voor Duolingo-studenten om de sprong te maken van de virtuele omgeving naar de reële Esperanto-beweging.
- Een cursus voor enigszins gevorderden, die al een behoorlijke woordenschat hebben en de hele grammatica al eens geleerd hebben (maar nog niet tot in de puntjes beheersen). Tijdens de cursus zullen zij kunnen oefenen met spreken, luisteren en lezen, en hun kennis uitbreiden.
- Een cursus voor ervaren Esperantisten, omdat het leren van een taal nu eenmaal nooit af is! Zij zullen zich onder andere bezighouden met Esperanto-cultuur en –literatuur.

Om te zorgen dat de cursusgroepen de juiste omvang hebben, worden de deelnemers gewoonlijk verdeeld in vijf groepen. Elke groep heeft zijn eigen docent, die de groep het hele weekend begeleidt.
Het lesprogramma van het studieweekeinde is behoorlijk intensief en daarom zorgt de organisatie dat op de juiste momenten eten en drinken klaar staan (vrijdagavond moet men echter zelf brood meenemen). Wel wordt enige hulp gevraagd bij het dekken en afruimen van de tafels…
Krikkenhaar ligt in de buurt van de Oost-Nederlandse stad Almelo. Zo nodig wordt vervoer vanaf het **station Almelo de Riet** verzorgd.
Je bent welkom op **vrijdagmiddag vanaf 17:00 uur** en de bijeenkomst is zondag om ongeveer 16:00 uur afgelopen.

**Meer informatie** en het aanmeldingsformulier staan op de website van Esperanto Nederland
**esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend.php**

Eventueel retouradres: Esperanto Nederland Ledenadministratie, Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord